

Geografia nomenklature, 9-a parto
La sufikso -i
Claude Gacond, 290-a radioprelego, 1969.04.30 & 05.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklature.

La pasintan semajnon ni konstatis, ke la lingvo Volapük tre verŝajne influis Zamenhof. El tiu influo naskiĝis la idiotismo **patrujo**, kies analizo ne kondukas al la nocio **patrolando** aŭ **patrio**. Ni konstatis, ke la kritikoj kontraŭ la formoj **Brazilujo**, **Holandujo** estis pravaj. Tiuj pleonasmaj formoj estis forigendaj idiotismoj. Sed ni konstatis, ke konstruoj kiel Brazilio, Kanadio estas logikaj. Ni hodiaŭ provos komprenigi kial.

Cl.- Gaston Waringhien en sia *Suplemento al la Plena Vortaro de Esperanto* tiel difinas la signifon kaj rolon de la sufikso -i :

A.- « *i*. Internacia sufikso uzata : unue por formi landnomon el samnoma ĉefurbo aŭ rivero : Meksikio, Tunizio, Alĝerio, Luksemburgio ; Nigero ; **due** por formi landnomojn el la nomo de la loĝanto. Tiam **i** egalas **uj**. »

Cl.- Sekvas rimarko, kiu finiĝas per tiuj vortoj :

A.- *Estas eraro uzi la sufikson i ĉe landnomoj, kiuj ne respondas al difinita gento, kiel Kanado, Maroko, Venezuelo... »*

Cl.- Malgraŭ tiu konsilo de Gaston Waringhien la movado SAT, kiu eldonis la *Suplementon al la Plena Vortaro de Esperanto*, uzas en sia *Jarlibro* formojn kiel **Kanadio** kaj **Brazilio**.

A.- Por ili, kiel por multaj esperantistoj, la konsilo de Gaston Waringhien estas la konsekvenco de erara kompreno de la signifo kaj rolo de la sufikso **i**. Por ili, tiu sufikso ne nur havas landforman rolon. Por ili ĝi ne estas ligita kun gentaj konsideroj. Do ili ne akceptas la sinonimecon kun la sufikso **uj**. Do aŭtomate la reguloj, kiuj konvenas al la sufikso **uj**, por ili ne plu konvenas al la sufikso **i**.

Cl.- Ni diris, ke por tiuj esperantistoj la sufikso **i** ne nur havas landforman rolon. Ni donu kelkajn ekzemplojn :

A.- Oni scias, ke la riveroj **Rodano** kaj **Rejno** vizitas plurajn landojn. Ĉirkaŭ tiuj riveroj ne konstruiĝis nacioj, sed tamen pro la ligoj, kiujn ili favoris, kreiĝis ĉirkaŭ ili iuj homaj rilatoj, kiuj lasis profundajn spurojn en la arkitekturaj kutimoj, en la popolaj moroj, en la komerco, industrio, agrokulturo. La geografoj kaj historiistoj emas mape difini la teritoriojn, kie tiuj spuroj estas videblaj. Tiam ili parolas pri **Rodanio** kaj **Rejnio**, kvankam ne estas landoj.

Cl.- Same oni povus paroli pri **Danubio**, **Ganio**, **Indusio** aŭ **Amazonio**, kiam oni volus difini, laŭ iuj historiaj aŭ geografiaj vidpunktoj, la teritoriojn, kiuj dependas de la riveroj **Danubo**, **Gango**, **Induso** aŭ **Amazono**.

A.- Sed ne nur riveroj estras tiajn teritoriojn. La montaroj trudas iujn vivformojn sur vastaj regionoj. En geografio, historio, faŭno kaj flaŭro, arkitekturo, agrokulturo oni serĉas la limojn de tiuj teritorioj, kiuj en nia lingvo povus facile ricevi nomojn dank'al la sufikso **i** : **Alpio**, **Karpatio**, **Kaukazio**, **Uralio** estas terminoj tute konvenaj al la genio de nia lingvo.

Cl.- Oni parolas pri la mediteranea civilizo, pri la atlantika mondo, kaj oni sentas, ke la sufikso **i** ebligas konstrui vortojn kiel **Mediterraneo**, **Atlantiko**, kiuj povus konveni al priskriboj de tiuj geografiaj rilatoj.

Geografia nomenklature, 9-a parto

La sufikso -i

Claude Gacond, 290-a radioprelego, 1969.04.30 & 05.03

A.- Regionoj ofte dividitaj en multaj regnoj, aŭ kiuj formas parton de landoj, emas ricevi geografian difinon. Multaj homaj konfliktoj naskiĝis en la **balkana duoninsulo**, aŭ ni povus diri en **Balkanio**.

Cl.- Kiel pruvas la vorto **patrio**, la sufikso **i** povas formi geografian aŭ teritorian terminon ne nur ekde geografia nomo. Kial nur paroli pri **patrio**, ĉu ne povas ekzisti **patrinio**, **avio**, **avinio** ? Se la unua el tiuj formoj estas logika kaj konforma al la spirito de nia lingvo, la aliaj ankaŭ estas eblaj por permesi paroli pri la lando de la patrino, de la avo kaj de la avino aŭ pri la patrinlando, avolando kaj avinlando.

A.- Kaj oni eĉ povas pensi al elmigrintoj, kiuj sopiras al la **infanecio** aŭ **infanecolando**.

Cl.- Botanikisto, kiu devas desegni sur mapo la kreskoterritorion de planto aŭ arbo, ankaŭ estos kontenta trovi la sufikson **i**. Vi tute certe iam vidis mapon, sur kiu estas desegnita la kreskolimo de la **daktilarboj**, **olivarboj** kaj **tritiko**. La regionoj, kie ili kreskas, povus ricevi nomojn kiel **daktilio**, **olivio** kaj **tritikio**.

A.- Oni povas imagi la samon pri la faŭno. Biologo, kiu priskribas la vivon de la **marmotoj** eble sentos la bezonon desegni sur mapo la teritoriojn, kiujn ili okupas. Tiu teritorio povus esti nomata **marmotio**.

Cl.- Ni atentigis pri formoj, kiujn vi eble neniam vidis kaj al kiuj vi eble neniam pensis. Ni volis reliefigi la diversajn eblajn rolojn de la sufikso **i**. Vi eble komprenis, ke la difino de tiu sufikso far Gaston Waringhien en la *Suplemento al la Plena Vortaro de Esperanto* estas tro limigita.

A.- Se ĝis nun tiu sufikso **i** estis ĉefe uzata por formi landnomojn, ĝi ankaŭ povus estis facile uzata por formi teritori-nomojn, kaj tio ne nur el urboj, riveroj aŭ gentoj, sed ankaŭ el plej neatenditaj nomoj geografiaj, homaj, flaura aŭ faŭnaj.

Cl.- Se ni devus difini la signifon de tiu sufikso **i** ni dirus : **i**. Sufikso signifanta teritorio, lando, regno, tero, mondo karakterizata de la radiko : Amazono – Amazonio ; italo – Italio, aŭstrala – Aŭstralio, Tunizo – Tunizio. En noto ni rimarkigus, ke se la sufikso **uj**, kun sia konkreta signifo de **entenilo** estas ligita kun ideologio de gento kaj eĉ de raso, la sufikso **i** havas nenian similan signifon. **i** ne estas egala al **uj**.

A.- La kredo je la sinonimeco inter la sufiksoj **i** kaj **uj** kondukis al lingvaj eraroj. **Francujo**, **Svisujo**, **Ĉinujo** signifas « **ujoj por la francoj, svisoj, ĉinoj** ». Tio kompreneble ŝokas la komunan saĝon kaj ne povas esti akceptata de la sennaciistaj esperantistoj. **Francio**, **Svisio**, **Ĉinio** perdas tiun ideologian signifon. La ideo pri **ujo** malaperis. La radikoj **franc**, **svis** kaj **ĉin** estas uzataj kiel ĉefa karakterizilo. Kiel en **panejo** ne nur troviĝas **pano**, en **Francio** ne necese troviĝas nur **francoj**. **Francio**, **Svisio**, **Ĉinio** signifas : la teritorioj, landoj karakterizataj de la francoj, svisoj, ĉinoj, do la landoj franca, svisa kaj ĉina.

Cl.- En la **uj**-sistemo formoj kiel **Kanadujo**, **Amazonujo**, **Aŭstralujo**, **patrujo** estas idiotismoj, pro la entenila signifo de la sufikso. En la **i**-sistemo formoj kiel **Kanadio**, **Amazonio**, **Aŭstralio**, **patrio** estas logikaj, ili signifas la Kanada lando, amazon-teritorio, aŭstrala kontinento, patra tero.

A.- La venontan semajnon ni komparos ambaŭ sistemojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-